

## & Antaŭsignoj:

< Rekante 25 el 47 batoj por strofo, entute 752 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:47> (

/mi mifa somi rere dodo; do domi redo TiLa So So; mi mifa somi rere dodo; So Sodo mimi rere do do;

(#Rekantaĵe: SoSo dodo mimi re Tido re; so soti laso mire mi i; SoSo dodo mimi re Tido re; so soti laso mire do do o)

)×16 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua parto:

'1 /En tiu temp' ni estis bando ; Ne el paper', ne el kartono, ; Ne kiel kotiljongirlando, ; Sed brava band' el fajroŝtono.

(×:; **Kuris ni sur stratoj en juna aĝ'** ; **Ankoraŭ mankas ĉu la saĝ'** ; **Kuris ni sur stratoj en juna aĝ'** ; **Ankoraŭ mankas ĉu la saĝo.**)

'2 Hej, kiel ŝprucis la fajreroj, ; Se kun filistroj ni petolis! ; Knabinoj virtaj en kameroj ; Sin riglis dum ni preterbolis. ....

'3 Kokritaj edzoj nin rigardis ; Okulminace kaj detruie ; Kaj siajn edzinetojn gardis ; Pli bone nun, sed tro malfrue! ....

'4 La mastroj de diboĉbutikoj ; Nin timis kiel nigran peston, ; Ĉar ni porpage per urtikoj ; Al ili tiklis la post...keston. ....

'5 La hundojde l' kvartalo same ; evitis niajn noktpatrolojn, ; Se ne, ĝis la mateno lame ; Ili posttiris kaserolojn. ....

'6 Finiĝis fars', – la tempo pasis, ; Ni burĝe portas nun titolojn, ; La Viv' de longe jam frakasis ; Tiamajn revojn kaj idolojn. ....

#### ,& Dua parto:

'7 Antaŭ nelonge ni retrovis ; Nin ĉiujn ĉe amik' komuna ; Kaj vane komplimenti provis ; Reciprokante: "Ĉiam juna!" ....

'8 Ĉar la tempiojn – sen riparo – ; Anserpiede stampas faldoj, ; Kaj la ĉapitro de l' hararo ; Prezentas sin kundebetsaldoj. ....

'9 Jen kiu per avida ŝmaco ; Fumadis dum studentaj jaroj ; La remburherbojn de l' matraco, ; Nun pompas kun baroncigaroj; ....

'10 Alia, kiu tro aŭdace ; Konstruis sur epikurismo, ; Nun marŝas peze, kaj grimace; Li plendas jam pri reŭmatismo; ....

'11 La tria, kiu cikoniojn ; Asistis dum noktvivo peka, ; Nun pie flustras litaniojn ; Kaj hejmeniras je la deka; ....

'12 La kvara vivis per pruntpreno ; Aŭ dank' al senprovizaj ĉekoj; Nun estas lia entrepreno; Pruntdoni kontraŭ hipotekoj! ....

'13 Ve! kamaradoj, jam aŭtune ; Pril' vintro nin avertas signoj, ; Ni baldaŭkantos ĉiuj kune ; La faman kanton de la cignoj. ....

'14 Ni maljuniĝis, evidente, ; Sed pleje maljuniĝis tiu, ; Kiu admonis nun lamente, ; Ke ni ne tiel laŭte krii, ....

'15 "Ĉar," diris li al ni konfide, ; "Filino mia min ĉagrenas, ; Ŝi... plidikiĝas tro perfide, ; Kajtionmi ne plukomprenas. ....

'16 "Ho, kara nia," tuj ni ĥoris, ; "Vi kadukiĝis efektive; ; Bruligi, kion vi adoris, ; Signifas morti jam dumvive!" ....)